

L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo
Bulletin mensuel du Groupe Espérantiste Gantois
Maandelijksch tijdschrift van den Gentschen Esperantisten Groep.

REDAKCIO :

RÉDACTION :


REDACTIE :

Michel Sebruyns

34, Rue de Gand,

MONT-ST-AMAND

LEZ GAND.



ADMINISTRACIO :
kaj ANONCOJ :

ADMINISTRATION
et ANNONCES :

ADMINISTRATIE en
AANKONDIGINGEN :

Henri Petiau

60, Boul^d St. Liévin

GAND.

Enhavo : Esperantista Semajno Kongreso. - Gento. - Avizo! - Bibliografio. - Kolektado. - Interŝanĝado.

Sommaire : Technique de l'Espéranto. - Congrès International d'Espéranto. - Cours d'Espéranto.

Inhoud : Tekniek van Esperanto - Internationaal Esperanto-Congres. Leergang van Esperanto.

Unu numero 0.10 fr. Le numéro 0.10 fr. Het nummer 0.10 fr.
Abonprezo : 1 fr. po jaro (Belgujo) 2 fr. po jaro (eksterlando)

GENTO 1913.

L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo.

Redakcio :

MICHEL SEBRUYNS

RUE DE GAND 34, M^l S^t AMAND (Gand.)

Administracio ka Anoncoj :

HENRI PETIAU

60, BOULEVARD ST. LIÉVIN, GAND.

Ne presitan manuskripton oni ne resendas. La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskripton.

Por ĉio, kio koncernas la redakcion, sin turni **eksklusive** al la ĉefredaktoro S^{ro} M. SEBRUYNS, 34, Rue de Gand, Mont St. Amand, (Gand.)

Ce numéro est tiré à un nombre double d'exemplaires.

Dit nummer wordt op een dubbel getal exemplaren gedrukt.

Technique de l'Espéranto.

L'Espéranto, on ne saurait trop le répéter, est une création absolument générale, surtout pour atteindre l'objet international que son créateur s'est proposé.

« Par sa constitution même, l'Espéranto est, »
» pour chacun, Allemand, Anglais, Espagnol, »
» Français, Flamand ou Italien, la langue la »
» plus voisine de la sienne des langues »
» étrangères, il est pour nous tous, celle qui »
» l'est le moins. En effet, l'Espéranto n'est »
» pas une langue créée par un homme, mais »
» simplement une langue tirée des langues »
» indo-européennes, dont il est comme la »
» synthèse ou "l'aboutissement". Celles-ci »
» étant considérées comme des forces on »
» pourrait dire que l'Espéranto en est la »
» résultante. (1)

M. Bourlet a montré d'une façon saisissante, [extrait ci-dessous en guillemets] quelques-unes des simplifications sensationnelles de la langue, en même temps que sa remarquable internationalité :

« Un anglais à qui je montrais un dictionnaire Espéranto-Anglais me dit : " Mais il »
» n'y a que des mots anglais dans cette »
» langue ! „ Et souvent on reproche à »
» l'Espéranto d'être trop Français !

« Mais, en dehors de ce choix fécond des racines, l'auteur de l'Espéranto a encore

Teknik van Esperanto.

Het kan niet genoeg herhaald worden, dat Esperanto eene geniale schepping is, voornamelijk om het internationaal doel te bereiken, dat de maker ervan zich heeft voorgesteld.

« Door zijne samenstelling zelf, is Esperanto »
» voor iedereen, Duitscher, Engelschman, »
» Spanjaard, Franschman, Vlaming of Italiaan »
» de taal die, onder al de vreemde talen, de »
» zijne meest nabij komt. Inderdaad, Espe- »
» ranto is geene taal, geschapen door een »
» man, maar eenvoudiglijk eene taal, getrok- »
» ken uit de bestaande Indisch-Europeesche »
» talen, waarvan het als de samenstelling of »
» de " gevolgtrekking „ is. Die talen, be- »
» schouwd als krachten, zou men mogen »
» besluiten dat Esperanto er de " résultante „ »
» van is „.

M. Bourlet, heeft op eene treffende manier (zie hieronder het uittreksel tusschen haakjes) getoond, eenige der meest in 't oog springende vereenvoudigingen der taal, alsmede zijne merkwaardige internationaliteit :

« Een Engelschman, aan wien ik een »
» Esperanto-Engelsch woordenboek toonde, »
» zegde mij : " Maar er zijn anders niet dan »
» Engelsche woorden in die taal ! „ En dan »
» verwijst men aan Esperanto te veel ver- »
» frantscht te zijn !

« Maar, buiten die gelukkige keus der

› employé deux moyens singulièrement fé-
› conds pour multiplier les mots sans charger
› la mémoire, ce sont : la dérivation et la
› composition.

« Toutes nos langues employent, plus ou
› moins logiquement, des préfixes et suffixes
› pour former des mots dérivés. Ainsi le
› Français se sert de divers suffixes pour
› désigner les noms de métier : ier, ien, eur,
› iste, re, etc. Et il dit : serrurier, bottier
› pharmacien, musicien, brossier, balayeur,
› flûtiste, violoniste, peintre, chanteur, etc.

« Malheureusement ces terminaisons n'ont
› rien de caractéristique ; et d'autre part, leur
› multiplicité même annihile les avantages
› que l'on pourrait tirer de leur existence.
› Qu'on apprenne à un étranger la liste de
› ces terminaisons, pour lui faciliter l'acqui-
› sition du Français ; et lorsqu'on lui demandera
› ce que c'est qu'un chantier, il vous dira que
› c'est un homme qui chante, et il croira qu'un
› légumier est un marchand de légumes.
› D'ailleurs, inversement, pour nommer un
› homme dont le métier est de frotter, il ne
› saura pas s'il doit dire frottier, frottien,
› frotteur ou frottiste. Pourquoi, si teinture,
› donne teinturier, le mot peinture donne-t-il
› peintre ?

« En Espéranto, il y a un suffixe, isto, et
› un seul, pour former, par dérivation, des
› noms de métiers ; et, ainsi, dès que je
› connais les mots : boto, pordo, matematiko,
› fluto, je sais la signification des mots
› botisto, pordisto, matematikisto, flutisto,
› etc. ; et, inversement, je forme ces mots
› sans avoir à me demander s'ils existent,
› sans avoir à chercher s'ils sont conformes
› à l'usage. L'Espéranto ne connaît pas
› d'entraves, il n'admet aucune exception, et
› ses seules lois sont la régularité et la
› logique. On conçoit qu'ainsi, avec ses
› 32 affixes, à sens fixe, bien déterminé, et
› unique, on puisse faire dériver d'un même
› radical tous les mots de la même famille,
› qui, dans nos langues, affectent si souvent
› des formes ainsi variées qu'arbitraires ».

(à suivre.)

(1) Th. Cart. Rapport au ministre de l'Instruction
publique sur la langue auxiliaire internationale.

› stamwoorden, heeft de schepper van
› Esperanto zeer eenvoudige en trefferde
› middels gebruikt om de woorden te ver-
› menigvuldigen, zonder het geheugen te
› overlasten, namelijk : de afleiding en de
› samenstelling.

« Al de talen gebruiken, min of meer
› logisch, voor- en achtervoegsels om afgelei-
› de woorden te vormen. Zoo gebruikt het
› Vlaamsch verscheidene achtervoegsels om
› de bedrijven aan te duiden ; ier, ien, er, aar,
› ist, ant, enz. en men zegt : bankier, kan-
› tonnier, elektricien, mekanicien, onder-
› wijzer, schilder, makelaar, handelaar, dro-
› gist, violonist, muzikant, fabrikant, enz.,
› Ongelukkiglijk hebben die uitgangen niets
› kenmerkends : van den anderen kant kunne
› menigvuldigheid zelf vernietigt de voor-
› deelen, die men uit hun bestaan zou kunnen
› trekken. Dat men aan eenen vreemdeling de
› lijst dier uitgangen aanleere, om hem de
› studie der Vlaamsche taal te vergemakke-
› lijken ; vraagt men hem nu welke de man
› is die den stiel van wasschen uitoefent, hij
› zal niet weten of hij moet zeggen wasschier,
› wasschien, wasscher, wasschaar, wasschist,
› of wasschant. En waarom, indien : onder-
› wijzèn, onderwijzer ; slachten, slachter ;
› bleeken, bleeker geeft, waarom geeft :
› schilderen, schilder, smeden, smid, enz. ?

« In Esperanto is er één achtervoegsel, één
› enkel ! om, bij afleiding, de namen der stiel-
› mannen te vormen ; en dus, zoo ik de woor-
› den : boto, pordo, matematiko, fluto, enz.
› ken, vat ik aanstonds de beteekenis van :
› botisto, pordisto, matematikisto, flutisto enz.
› en omgekeerd maak ik die woorden, zon-
› der mij te moeten afvragen of zij bestaan.
› Het Esperanto kent geene hinderpalen, het
› neemt geene enkele uitzondering aan, en
› zijne eenige wetten zijn : de regelmatigheid
› en de logiek. Zoo begrijpt men lichtelijk,
› dat men bij middel der 32 bijvoegsels, die
› allen eene bepaalde, zekere en eenige
› beteekenis hebben, men van één enkel
› stamwoord al de woorden der zelfde familie
› kan afleiden, die - in onze talen - zoo vaak
› zulke verscheidene en willekeurige vormen
› aannemen

(vervolgt.)

Congrès International d'Espéranto.

Le congrès International d'Espé-
ranto, qui eut lieu à Gand du 14 au
20 août dernier, a obtenu un très vif
succès. Plus de cinq cents congres-
sistes, représentant une vingtaine de
nationalités différentes, avaient ré-
pondu à l'appel du comité orga-
nisateur.

Sa Majesté le Roi Albert, fit au
congrès le grand honneur de lui
accorder son Haut Patronage, mon-
trant ainsi l'intérêt qu'elle porte à
l'Espéranto. M. le baron de Kerck-
hove d'Exaerde, gouverneur de la
Flandre Orientale, et M. Braun,
bourgmestre de la ville de Gand en
acceptèrent la Présidence d'Honneur.

Le congrès eut lieu au Palais des
Fêtes à l'Exposition. M. le Gouverneur
honora de sa présence la séance
d'ouverture, et se déclara enchanté
d'avoir pu constater par lui même
combien l'Espéranto est une langue
harmonieuse. (L'Espéranto fut la seule
langue parlée pendant toute la durée
du congrès à l'exception du speech
de M. le Gouverneur, qui parla en
Français, s'excusant de ne pouvoir
le faire en Espéranto, mais il promit
que si un congrès avait encore lieu
à Gand ce serait en Espéranto qu'il
souhaiterait la bienvenue aux con-
gressistes).

Parmis les autorités présentes on
remarquait M. M. Albert Maertens-
Bracq, Président d'Honneur du comité
organisateur ; A. J. Witteryck, de
Bruges, Président de la Ligue Espé-

Internationaal Esperanto-Congres.

Het Internationaal Esperanto-Con-
gres, dat te Gent plaats had van den
14^{en} tot den 20^{en} Augustus, heeft
een welverdienden bijval bekomen.
Meer dan vijfhonderd Esperantisten,
een twintigtal nationaliteiten ver-
tegenwoordigend, hadden den op-
roep beantwoord.

Zijne Majesteit, Koning Albert,
bewees aan het Congres de uitsteken-
de eer zijner Hooge Bescherming,
zoodoende een bewijs gevende zijner
belangstelling in de wereldtaal
Esperanto. De Weledele Heer Baron
de Kerckhove d'Exaerde, Gouverneur
der Provincie Oost-Vlaanderen en
Mijnheer Braun, Burgemeester der
stad Gent gewaardigden zich den
titel van Eerevoorzitter aan te nemen.

Het Congres had plaats in het
Feestpaleis der Tentoonstelling.

De heer Gouverneur vereerde met
zijne tegenwoordigheid de openings-
zitting en verklaarde verrukt te zijn,
te hebben mogen persoonlijk vast-
stellen hoe schoon en welluidend
Esperanto is. (Esperanto was de
eenige taal die gedurende gansch
het Congres gesproken werd, uit-
genomen de aanspraak van den heer
gouverneur, die in 't Fransch sprak,
zich verontschuldigend het niet te
kunnen doen in de Wereldtaal ; doch
hij beloofde dat, moest er in 't vervolg
nog een Congres te Gent plaats
hebben, hij de Congressisten in
Esperanto zou verwelkomen.)

Onder de overheden bemerkten wij
de heeren Maertens-Bracq, Eerevoor-

rantiste Belge, Président du congrès; Mudie, de Londres, président de l'Association Universelle Espérantiste; Dr Johnson, d'Edimbourg, président de l'Association Universelle des médecins Espérantistes, etc. etc. Le docteur Zamenhof, inventeur de l'Espéranto et le Général Sébert, de Paris, Président du Comité permanent des Congrès d'Espéranto s'étaient fait excuser pour motif de santé.

M. Michel Sebruyns, président du comité organisateur et M. Petiau, secrétaire, représentaient le groupe gantois.

Le but du congrès était de rechercher les meilleurs moyens de propager l'Espéranto. Le point le plus sérieusement discuté fut naturellement l'introduction de l'Espéranto à l'Ecole. Pour atteindre ce but, il convient d'attirer l'attention des pères de famille sur l'utilité incontestable d'une langue auxiliaire internationale grâce à laquelle leurs enfants pourraient se créer facilement des relations dans le monde entier. Afin d'initier le public aux avantages de l'Espéranto, une série de conférences et de cours publics seront organisés dans toutes les villes et notamment à Gand où des conférences auront lieu tous les Lundis à 7 heures du soir à la *Salle des Notaires*, Place Laurent, à partir du **Lundi 6 octobre prochain**. Nul doute que d'ici peu l'Espéranto ne soit connu de tous les intellectuels.

Au cours du congrès des représentations en Espéranto eurent lieu au Théâtre Nèerlandais et ce fut une véritable révélation pour le public de constater combien l'Espéranto est

zitter van het Inrichtingskomiteit; A. J. Witteryck, van Brugge, voorzitter van den Bond der Belgische Esperantisten, voorzitter van het Congres; Mudie, van Londen, voorzitter van de Internationale Wereldvereeniging der Esperantisten; Doktor Johnson, van Edimburg, voorzitter der Internationale Vereeniging der Esperantische Geneesheeren, enz. enz.

De heer Dr Zamenhof, uitvinder van 't Esperanto, generaal Sebert, van Parijs, voorzitter van het Bestendig Comitéit der Congressen, hadden zich doen verontschuldigen om reden van ziekte.

M. Michel Sebruyns, voorzitter van het Inrichtingskomiteit en M. Petiau, sekretaris, vertegenwoordigden den Gentschen groep.

Het doel van het congres was de beste propagandamiddels op te zoeken om het Esperanto te verspreiden. Het invoeren van Esperanto in de school was natuurlijk het meest besproken punt. Om dit doel te bereiken, is het goed de aandacht der huisvaders te vestigen op het ontgensprekelijk nut van eene hulpwereldtaal, dank aan dewelke hunne kinders met alle gemak betrekkingen zouden kunnen aanknoopen met de geheele wereld. En om het publiek de voordeelen van 't Esperanto te doen vatten, zal eene reeks voordrachten en openbare leergangen ingericht worden in alle steden en namelijk te Gent, waar voordrachten plaats zullen hebben alle Maandagen, om 7 u. 's avonds in de *Notarissenzaal* Laurentplaats, te beginnen van **6 Oktober eerstkomend**. Voorzeker zal Esperanto

une langue douce et harmonieuse. Mais le clou de ces représentations fut certes la collaboration du ténor Lambrecht, professeur de chant bien connu à Bruxelles, qui, avec sa maestria habituelle, interpréta en Espéranto des airs de nos principaux opéras.

Sous le charme de la voix magnifique de l'excellent artiste, l'auditoire ne cessait d'applaudir frénétiquement. Rappelé cinq fois, M. Lambrecht chanta successivement *La Berceuse de Joselyn*, *Rigoletto*, *Plaisir d'Amour* *La Walkyrie* et *Carmen*.

Le baron de Kerckhove d'Exaerde, Gouverneur de la Flandre Orientale, qui honorait la fête de sa présence, a adressé ses plus vives félicitations au ténor Lambrecht et exprima toute sa satisfaction pour le plaisir qu'il avait eu à entendre chanter, en Espéranto, car ce fut pour lui une véritable révélation de constater que cette langue, comparable à l'Italien, pouvait s'adopter d'une façon aussi rythmique et aussi harmonieuse à nos plus grand airs d'opéras.

Brefs les congressistes se sont séparés enchantés de leur séjour à Gand et de leurs visites à la magnifique Exposition dont ils n'ont cessé de vanter la beauté.



binnen kort door al de intellectueelen gekend zijn.

Gedurende het Congres hadden voorstellingen in Esperanto plaats in den Nederlandschen schouwburg; het was eene ware veropenbaring voor het publiek vast te stellen wat zoetluidende en schoone taal het Esperanto is. Maar de « clou » was voorzeker de medewerking van den tenor M. Lambrecht, leeraar van zang, wel gekend te Brussel, die met zijne gewone maestria, in Esperanto, de voornaamste aria's uit de bijzonderste operas voordroeg.

Onder den betooverenden indruk der wonderschoone stem van den kunstzanger kwam er aan de toejuichingen der toeschouwers geen einde. Vijf maal teruggeroepen, zong M. Lambrecht opvolgenlijk: *la Berceuse de Joselyn*, *Rigoletto*, *Plaisir d'Amour*, *La Walkyrie*, en *Carmen*.

De Weledele Heer Baron de Kerckhove d'Exaerde, gouverneur van Oost-Vlaanderen, die het feest door zijne tegenwoordigheid verveerde, heeft den heer Lambrecht warm geluk gewenscht en bedankte dezen om het genoegen, zoo kunstig in Esperanto te hooren zingen. Inderdaad, het was voor hem eene ware veropenbaring te bestatigen, dat deze taal, die zoo wonderwel het Italiaansch nabij komt, zoo gemakkelijk en welluidend toe te passen is op 't gebied van zang, zoodanig dat de grootste operas er zich toe leenen.

In 't kort, de congressisten zijn vertrokken, grootelijks verrukt over hun aangenaam verblijf in onze stad en hun bezoek aan de onvergetelijke tentoonstelling, wier luister zij niet genoeg konden loven.

Cours d'Esperanto Leergang van Esperanto

Corrigé de la Traduction de la 7^e Leçon.

Verbetering der Oefening op de 7^e Les.

1. Dans un hôpital, à chaque pas, on rencontre des malades. 2. On balaie avec un balai. 3. Est-ce que Madame la Duchesse désire quelque chose à boire? 4. Un boulet de canon vola au-dessus de la maison de l'aveugle. 5. Obéis-moi et je te pardonnerai ta peccadille. 6. Vers quelle heure Sa Grandeur Monseigneur l'Evêque viendra-t-il dans notre ville? 7. Il est mort de haine. 8. Les parents travaillent pour leurs enfants. 9. Le ballot était plein de pierres. 10. Voilà une belle statue artistique de la Vierge. 11. De quoi Monsieur le Comte a-t-il parlé? 12. A son côté droit marche son épouse et sa mère (épouse). 13. Ne criez pas comme un fou, pour l'amour de Dieu! 14. Entrons dans la chambre du sourd-muet. 15. On rira certainement de vous! 16. De quoi vous plaignez-vous? 17. L'oiseau vola de l'autre côté de la rivière.

1. In een hospitaal, ontmoet men, bij iederen stap, zieken. 2. Men vaagt met eenen bezem. 3. Begeert Mevr. de Hertogin iets te drinken? 4. Een kanonbal vloog over de woning des blinden. 5. Gehoorzaam mij en ik zal u uwe fout vergeven. 6. Rond welk uur zal zijne Hoogwaardigheid Monseigneur de Bisschop in onze stad komen? 7. Hij stierf van nijd. 8. De ouders werken voor hunne kinderen. 9. De baal was vol steenen. 10. Zie daar een schoon kunstig beeld van Maria. 11. Waarvan heeft Mijnheer de Graaf gesproken? 12. Aan zijne rechterzijde stapt zijne echtgenoot en hare moeder. 13. Roep niet als een krankzinnige, om de liefde Gods! 14. Laat ons de kamer van den stom-doove binnengaan. 15. Men zal zekerlijk met u lachen! 16. Waarover beklagt gij u? 17. De vogel vliegt naar gene zijde des oevers.

8^e LEÇON

“ De „ et “ Da „

Il y a une notable différence entre ces deux prépositions.

“ DE „ désigne 1^o la possession, 2^o l'attribution ou destination. 3^o le point de départ.

Ex.-Voorb. — La patro de Johano (le père de Jean-de vader van Jan); Karafo de biero (une carafe à bière-*een* bierkaraf); de tiu tago (depuis ce jour-sedert dien dag.)

8^e LES

“ De „ en “ Da „

Er bestaat een merklijk verschil tusschen deze twee voorzetsels.

“ DE „ duidt aan, 1^o het bezit, 2^o de bestemming, 3^o het vertrekpunt.

“ DA „ s'emploie après les mots, exprimant la mesure, le poids, le nombre ou la quantité.

“ DA „ wordt gebruikt na de woorden die uitdrukken : de maat, 't gewicht, 't getal of de hoeveelheid.

Ex.-Voorb. — Taso da kafe (une tasse de café-*eene* tas koffie); Kilogramo da rizo (un kilogramme de riz-*een* kilo rijst); Dekduo da glasoj (une douzaine de verres-*eene* dozijn glazen); Amaso da personoj (une foule de personnes-*een* hoop personen.)

Les mots composés.

Les mots composés, une des richesses de l'espéranto, s'obtiennent par la simple juxtaposition des éléments qui les composent en plaçant le mot fondamental à la fin.

Ex.-Voorb. — En - iri = eneri (entrer-*binnengaan*); For - iri = foiri (s'éloigner-*weggaan*); Ĉiu - jara = ĉujara (annuel-*jaarlijksch*); Morto - pafi = mortpafi (fusiller-*door den kop schieten*); Lipoj - haroj = lipharoj (moustache-*knevel*); Post - tago - mezo = posttagmezo (après midi-*namiddag*); Sama - urbo - ano = samurbano (concitadin-*stadgenoot*.)

REMARQUE : Si l'euphonie ne s'y oppose pas, on omet la caractéristique du premier élément ou des premiers éléments.

Suffixe “ ER „

Ce suffixe marque l'unité partielle d'une chose ou d'une matière, prise en totalité, c. a. d. considérée elle-même comme unité.

Ex.-Voorb. — Mono (argent-*geld*); monero (pièce de monnaie-*geldstuk*); Neĝo (neige-*sneeuw*); neĝero (flocon de neige-*sneeuwvlok*); Sablo (sable-*zand*); sablero (grain de sable-*zandkorrel*); Fajro (feu-*vuur*); fajrero (étincelle-*vuursprankel*.)

Préfixe “ RE „

“ RE „ marque : 1^o Le retour vers le point de départ.

Ex.-Voorb. — Aĉeti (acheter-*koopen*); reaĉeti (racheter-*weder afkopen*); Salto (saut-*sprong*); resalto (bond-*terugsprong*); Konduki (conduire-*leiden*); rekonduki (reconduire-*terugleiden*.)

Samengestelde Woorden.

De samengestelde woorden, een der schatten van Esperanto, worden bekomen eenvoudiglijk door het naast elkander plaatsen der bestanddeelen, waaruit zij samengesteld zijn, 't grondwoord van achter.

BEMERKING : Indien de wel-luidendheid het toelaat, laat men den uitgang van het eerste lid, of der eerste leden weg.

Achtersvoegsel “ ER „

Dat achtersvoegsel duidt aan de gedeeltelijke eenheid eener zaak of stof, in haar geheel genomen, t. i. z: als eenheid beschouwd op haar zelf.

Voorvoegsel “ RE „

“ RE „ beduidt : 1^o de terugkeer naar 't vertrekpunt.

2^o La réitération ou la répétition. 2^o De herneming of de herhaling.

Ex.-Voorb. — Koni (connaître-kennen); rekoni (reconnaître-herkennen);
Maçi (mâcher-kauwen); remaĉadulo (un ruminant-*een* herkauwer.)

Omission de la préposition
française " DE „

Weglating van 't Vlaamsche
voorzetsel " VAN „

En Espéranto on ne traduit pas le mot " DE „ qui suit le verbe, l'adjectif ou l'adverbe dans certains cas. In Esperanto vertaalt men 't woord "VAN„ niet dat in sommige gevallen 't werkwoord, 't hoedanigheidswoord of 't bijwoord voorafgaat.

Ex.-Voorb. — Oni malpermesas eniri (on défend d'entrer-men verbiedt **van** binnen te gaan); Kiel feliĉa mi estas revidi vin! (Que je suis heureux **de** vous revoir-wat ben ik gelukkig **van** u weder te zien!); Estas dangere ludi per fajro (Il est dangereux **de** jouer avec du feu-'t is gevaarlijk **van** met vuur te spelen.)

Vocabulaire.

Woordenlijst.

Hajlo (grêle-hagel); Glacio (glace-ijs); Polvo (poussière-stof); Pulvo (poudre à tirer-schietpoeder); Greno (blé-graan); Litro (litre-liter); Tapiŝo (tapis-tapijt); Biero (bière-bier); Decilitro (décilitre-deciliter); Ligno (bois (matière)-hout); Fero (fer-ijzer); Botelo (bouteille-flesch); Oleo (huile-olie); Sako (sac-zak); Pagi (payer-betalen); Ŝerci (railler-schertsen); Moki (se moquer-bespotten); Eksplodi (faire explosion-ontploffen); Sufiĉi (suffire-voldoen); Kaŝi (cacher-wegsteken); Versi (verser un liquide-uitgieten (eene vloeistof); Ŝuti (verser un solide-uitstorten (eene vaste stof); Peza (lourd (ou) pesant-zwaar); Kial (pourquoi? - waarom?); Odori (sentir (ou) répandre une odeur-ruiken (of) eenen reuk verspreiden); Veturi (aller en véhicule-rijden met een voertuig); Kapti (prendre (ou) attrapper-vatten (of) pakken); Koni (connaître-kennen); Konduki (conduire-geleiden); Formi (former-vormen); Vengĝi (venger-wreken); Soni (rendre un son-eenen klank geven); Opinii (croire (ou) être d'avis (ou) penser-gelooven (of) van gedacht zijn (of) denken); Agi (agir-handelen); Rapida (rapide-snel); Sama (même-gelijk (of) zelfde); Necesa (nécessaire-noodig);

Traduction.

Vertaling.

1. La kamparano pagos morgaŭ la cent litrojn da greno. 2. Sablero falis en mian maldekstran okulon. 3. Fajrero sufiĉas por explodo. 4. La neĝa tapiŝo kaŝas la kamparon je niaj okuloj. 5. Kiom da akveroj enhavas la maro? 6. En la karafo de biero estas nur kelkaj akveroj. 7. Tuj centjaruloj estas samurbanoj. 8. Ne estas necese, ĉiam rediri la saman aferon. 9. Kiam forveturos la rapidvagonaro? 10. La vaporŝipestro havas lip-kaj vangharojn. 11. Postmorgaŭ, je la posttagmezo, mi vizitos submarŝipon. 12. Dum la lasta liber-tempo mi estis tre feliĉa rividi mian germanan amikon.

Esperantista Semajno Kongreso

en Gento okazinta de la 14^a ĝis la 20^a de
Aŭgusto 1913.



Por fariĝi konvinkita esperantisto estas necese, laŭ oni ĉiam aŭdas diri kaj tio estas la vero, esti partopreninta esperantistan universalan kongreson, esti parolinta kun diversnaciaj samideanoj. Tiam nur oni spertas kiom taŭga, altvalora estas nia kara helplingvo. Kaj efektive ĉu nia Esp. Semajno ne iom similis al tia kongreso, ĉu oni ne sin sentis feliĉa konatiĝante kun la partoprenantoj, preskaŭ 500, venintaj krom el nia Belgolando, kelkaj el Francujo, Anglujo, Germanujo, Hongrujo eĉ el Aŭstralio? Kiu, kunfratiĝante kun ili, ne sendis el interne de sia animo dankon al nia glora majstro pro lia senkomparebla bona eltrovo?

Verdire ne tiom grandioza ol universalaj kongresoj estis la nia, ne tiom multnombraj la partoprenantoj, oni ne havis tiun aron da diversspecaj diskutotajoj. Tamen ne malpli la komitato zorgis por inde akcepti la samideanaron, ne malpli oni organizis festojn por agrabligi ĉies restadon en la gastema Gent'o, ankaŭ ne malpli servemaj estis ĉiuj anoj de la Genta kaj Gentbrugga grupo por fari ĉiuspecajn servojn al la fremdlandaj samcelanoj. Ka se estis nur unu pridiskutaĵo "Kiu estas la plej bonaj rimedoj por bone propagandi esperanton,, ĝi estis plej inda je la kongreso. Ke ĝi atentigis multajn tion pruvis la multnombro de la respondintoj al tiu grava demando.

Antaŭ la malfermo de la kongreso en granda teretaĝa klaso de komunuma lernejo, metita afable de la urbestro je la dispono de la komitato, lertaj manoj metis ĉion en ordo por akcepti la gekongresanojn. La blankaj sed iom nudaj muroj malaperis sub la verdkoloraj standardoj. Estis tempo ĉar tuj je la malfermo de la akceptejo jam de la unua tago, jaŭdon 14^{an} de Aŭgusto aro da Esperantistoj venis haviĝi siajn kongrespaperojn: koverto enhavanta kongreslibron, ekspoziciplanon, kongreskarton eĉ rabatbiletojn por la amuzajoj de la ekspozicio kaj, mi ne forgesu, la blankrondan insignon kun granda verda stelo enmeze, kiun ĉiuj tuj fiere alfiksis sur sian bruston kvazaŭ por tuj diri ĉe la strato al la mirantaj pasantoj: Ĉu vi ne scias kiuj estas ni? Ĉu vi ne konas la signifon de tuj kvinpinta verda stelo? Alproksimiĝu geamikoj, se vi havas paciencon kvinminutan por serioze aŭskulti, ni estas certaj ke vi ankaŭ deziras esti ano de nia pacocelanta armeo. En alia parto de la ĉambrejo ankaŭ estis instalitaj la sekretariejo, la oficejo de la logiga komitato kaj la vendejo. Tie estis haveblaj ilustritaj P.K., libroj, markoj ĉiuspecaj, kaj aliaj esperantajoj. Multvizitata estis tiu loko sed ankaŭ la sekvantan tagon 15^a de

Aŭgusto kiam preskaŭ ĉiuj alvenantaj vagonaroj alportis kelkajn partoprenantojn. Ĉiuj rapidis por povi akurate ĉeesti la malferman kunsidon en la Festpalaco de la ekspozicio je la deka matene. Tie malantaŭ granda tablo sidis la eminentularo.

S^{ro} Witteryck, Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista malfermis la kongreson proponante kiel honorprezidanton S^{ro} Maertens, kiel prezidanton S^{ro} Sebruyns, vicprezidantojn, S^{roj} De Bruycker Gentbrugge, A. Vermandel Antw. kaj S^{ro} Ernst Charleroi; kasistoj S^{ro} Fouquet kaj Barbe, sekretario S^{ro} Petiau, helpsekretario S^o V. Cleemput kaj kiel membroj F^{no} Schepens, S^{roj} Simonis kaj Vermandere. Unuanime oni aprobis.

S^{ino} Tiard el Parizo plej profunde tuŝita en koro komunikis emociplene al la ĉeestantaro la ĵus alvenintan funebran sciigon: la subita morto de S^{ro} Carlo Bourlet, ĉefredaktoro de la "Revue", unu el la plej viglaj Parizaj pioniroj. Ĉiuj aŭskultis tiun dolorigan novaĵon starante.

Post salutoj de kelkaj aliaj fremdaj esperantistoj tiu unua oficiala kunveno finiĝis.

Multaj pasigis la tutan posttagmezon vizitante la vidindaĵojn de nia belega Ekspozicio. Je la 7^a vespere oni kunvenis en la Flamanda Teatro kie Belgaj kaj eksterlandaj gesamideanoj amuzis la publikon per kantoj kaj deklamoj. Ankaŭ la drama sekcio de la Genta Grupo-Esperanto sukcese kiel la antaŭan jaron ludis la teatraĵojn "Fianĉiniĝo de Sovaĝulineto", originale verkita komedio de Fr^{no} J. Flourens el Béziers. Specialan mencion meritas la ĉefrolulino kiu kvankam ŝi nur lasthore eklernis sian rolon la tutan daŭron interesis la ĉeestantojn pro sia amuza, natura ludado.

Per la kanto l'Espero oni finis tiun agrablan memorindan tagon.

La morgaŭan tagon: Sabaton 16^a je la deka matene oni kunvenis en la akceptejo. Oni formis sur la granda korto sekvantaron malantaŭ la elpakigitaj grupaj standardoj kaj kontente kaj gaje oni trairis diversloke la urbon por fine halti je tagmezo en la urbdomo, kie, en la vasta akceptsalonego, akceptis la Skabenaj Moŝtoj De Weerd kaj Anseele ĉiujn kongresanojn prezentatajn de S^{ro} Maertens.

La skabeno De Weert salutis ĉiujn, li memorigis bedaŭrinde ne esperantlingve, ke estis la trian fojon ke li havis la plezuron akcepti oficiale esperantistaron, ke li favore al nia nobla celo deziras ke ĉiuj fremduloj alportu plej bonan impreson de la Genta urbo kaj ĝia interesplena ekspozicio. Granda aplaŭdo sekvis tiun alparolon. Dum pokaloj da ŝaŭmanta ĉampanvino estis oferataj, la organiza komitato, kelkaj eminentuloj kaj ankaŭ tiuj venintaj de plej malproksime estis prezentataj al la skabenaj moŝtoj. Kiam fine ili permesis la detalan viziton de la malnova urbdomo, la vortoj "vivu la skabenoj, vivu ili!", respondis tiun afablan proponon. Estis vere belega akcepto. Posttagmeze oni havis rean rendevuon apud la enirejo de la Festpalaco en la Parko. De tie grupe oni vizitis la florekspozicion organizitan de la famkonata firmo Gentbrugge "Van Houtte". Ni ne ekpenos detaligi ĉion kion oni tie admiris:

estis vera paradizo. Cetere ĉiuj jurnalaj sufiĉe bruegis ĝin kaj la vizitantoj spertis ke oni ne tro laŭdis la aldonitan famon: Gento urbo de antikvaj monumentoj, de industrio sed antaŭ ĉio urbo de floroj.

Vespere okazis komuna vespermanĝo kaj koncerto en la antikva kelo (utilata nun kiel restoracio) de la Draphalo. La tiea muzikistaro baldaŭ ek-ludis la esp. himnon l'Espero, kaj aliajn konatajn Flandrajn kantojn kiujn nia ĉarma samideanino F^{ro} Verhesschen esperante kantis. Tiu kunveno, en kiu oni havis okazon pli bone interkonatiĝi, certe faris plej bonan impreson al la multnombraj vizitantoj neesperantistaj.

Dimanĉon 17^{an} de Aŭgusto: Ĝenerala labora kunsido en la Festpalaco de la ekspozicio, la pritraktaĵo estis kiel mi jam diris "Kiuj estas la plej bonaj rimedoj por bone propagandi esperanton",

Ĝin malfermis S^{ro} Witteryck el Steenbrugge.

La honorprezidanto S^{ro} Maertens legis poste leteron de Lia Reĝa Moŝto en kiu Li komunikis ke Li akceptis la altpatronecon de la Esp. Semajno - Kongreso. Letero alvenis de S^{ro} Finet el Antwerpeno, kiu senkulpiĝis pro neĉeesto; ankaŭ de S^{ro} Sebert kiu anoncis la morton de S^{ro} Carlo Bourlet.

S^{ro} Maertens komencante la plej gravan temon rekomendis kiel plej efikaj propagandiloj:

la senpaga kurso gramatika kaj perfektiga.

Paroli ĉiam la esp. lingvon.

Organizi konkurson por gelernantoj

Disdono de vortaroj, poste diplomoj pri profesora kapableco Li daŭrigis klarigante kion oni jam faris en la Genta kaj Gentbrugga Grupoj.

Organizi paroladojn, muzikajn festojn.

Instruigi esp. en lernejoj.

Rekomendas la lernadon de esp. lingvo, poste fremdlandajn lingvojn Tiun alparolon oni vere aprobis. S^{ro} Maertens estis dankata de S^{ro} Witteryck kaj S^{ro} Meyer el Cambridge, eĉ S^{ro} Van der Biest proponis ke tiuj interesplenaj konsiloj estu presataj en Belga Esperantisto.

S^{ro} Rommel el Verviers konsideris la senpagajn kursojn kiel neutilaj senutilaj: li preferas la pagajn kursojn kaj redonon de la mono al tiuj, kiuj senescepte regule ĉeestis la kurson.

S^{ro} Witteryck samopinias aldonante ke laŭ diversaj cirkonstancoj ambaŭ povas utili.

S^{ro} Lelarge el Poltiers rakontis per, hol tiom belega voĉo, kelkajn vojaĝmemorajojn: li rekomendis antaŭsciigi de via elveno la samideanojn de la vizitota urbo. Ĉiuj rezervigos al vi plej agrablan akcepton kaj dume faru kun li la plej utilan propagandon.

S^{ro} Kolonelo Pollen, el Anglujo:

Portu ĉiam la verdan stelon de U. E. A. por inciti al demandoj.

F^{no} Moreau el Bruselo informas ke en la informejo por turistoj en ŝia urbo oni faras servojn per Esperanto. S^{ro} Jacobs el Antwerpeno sin esprimis jene:

Montru ke Esp. vivas.

Dum la festoj, vendu la programon kaj aldonu libreton po 0,10 fr. senpage.

Fendu asocion por geinstruistoj.

Lernu Esp. per patrina lingvo por forigi tiun furion inter Flandranaj kaj Valonoj.

Partoprenu kun standardo en sekvantaroj;

Faru ekskursojn.

S^o Witteryck fermis tiun unuan kunsidon disdonante al la ĉeestantoj propagandilojn donacitajn de nia sindonemega Honorprezidanto S^o Maertens.

Je la 3^a ptm. kunveno en la malnova Flandrujo: nur kelkope ni estis, malgraŭ tio ni faris multan propagandon ekz. ĉe la helpoficejo de la Ruĝa Kruco. Vespere je la 7^a en la Flama Teatra: prezentado de "Geedzigopeto", de Rokzano, novaperinta amuza triakta komedieto. Kvankam la pruvripetadoj ne estis plej bonaj, tamen plej kontentiga estis la prezentado. Honoron ankaŭ al ĉiuj gekantintoj kaj deklamintoj. Antaŭ la komenco de la dua akto de Geedzigopeto ĵus alvenis karavano el Anglujo estrita de S^o Mudie. Grandan ovacion oni faris al ili. Dum la sama vespero ankaŭ oni disdonis la premiojn al la personoj kiuj partoprenis la konkurson literaturan kaj desegnan de la Esp. Semajno. Ili ricevis, krom bele binditaj libroj, artoplenan diplomon, donaco de S^o Witteryck.

London 18^{an} de Augusto je la 10^a matene ferma kunsido en la palaco de la Festoj. Ĝin malfermis S^o Witteryck per la legado resuma de la hieraŭa kunveno.

La parolvico estante donita al S^o Mudie li laŭdas la grandan meriton de la bedaŭregata mortinto S^o Bourlet. Kiel plej taŭgaj propagandiloj li konsilas la instruadon de Esp. al la infanoj dum la libertempo, publikajn paroladojn en parkoj (laŭ Angla modo), haviĝi libron kiu elmontras la profitojn jam akiritajn per Esperanto, fari reklamojn en cigaredujoj kaj ĉokoladujoj, kiel en Francujo; parolas por la pagigota kurso - la procesioj - disdono de premioj; ne estas favora al la soldo por Esperanto, ĉar tio timigas la gelernantojn. Li finas sian interesan parolon sciigante ke en Anglujo oni pretigas folieton seslingvan (la sesa: Esp. lingvo) por enmeti en kovertojn sendotan al komercistoj.

S^o Witteryck lin dankas kaj ree parolas por la soldo ĉar ĝi jam donis en Belgujo tiom da kontentigaj rezultatoj. Ankaŭ dezirante aldoni kelkajn konsilojn li rekonigos ke li preparas reklamojn sur kajeraj kovertoj.

Proponas organizi konkurson per la helpo de ĵurnaloj: ekzemple respondu al tiuj tri demandoj:

1^a Nomu la bonajn konsekvencojn kiujn povas doni al ni la ĝenerala alprenado de internacia lingvo.

2^a Kial la latina lingvo aŭ nacia ne povos taŭgi kiel internacia lingvo.

3^a Montru kial Esperanto estas pli facile akirebla ol aliaj lingvoj.

Li ankaŭ proponas: dissendi presitajn leterojn al eminentuloj kun peto ke ili fariĝu sen iu kosto por ili, honoraj membroj. Se oni legas en gazetoj artikolojn kontraŭ Esperanto profitu el ili skribante al la redaktoroj kun la peto por enpresigi artikolojn favorajn.

En societo eĉ aliloke nomu la estrojn de la grupoj per ilia esperanta aldonnomo.

Ne estu ofendiĝema.

Ĉiu societo havu standardon.

F^{no} Moreau el Bruselo proponis ion novan. Dezirus ŝi ke oni starigu societon kies membroj, nur gefraŭloj, donus ĉiuj kvin frankojn al la societa kaso. Se la anoj edziĝus ili reobtenus la sumon kun la procento se la geedziĝintoj estas gesamideanoj, se ne la sumo estus perdita: tio estus por fondi familiojn esperantistajn. S^o Vermandel el Antverpeno rekomendas multajn komunikajojn per ĵurnaloj.

Esperanto ĉe la kuracistoj preparolis S^o Jöhnson el Skotlando: okazis antaŭ ne longe kongreso en Londono en kiu kuniĝis 8000 kuracistoj el 20 diversaj nacioj. Oni postulis la esp. lingvon kiel interkompreniĝilon.

S^o Maertens aldonis lastan dankon al ĉiuj parolintoj kaj S^o Witteryck ne forgesante al kiu ni ŝuldis tiun benindan interkompreniĝilon faris honoron al nia kara Majstro D^o Zamenhof.

Post la ferma kunsido okazis la festeno je la 1^a ptm. en la Borso. Pli ol cent partoprenis ĝin kaj prave ĉiuj laŭdis la bongustajn manĝaĵojn. Ankaŭ plezure estis aŭskultataj la kantoj kaj deklamoj esperantaj. Kiel kutime multaj tostoĵ estis farataj; citi ĉiujn estus vere trouzi vian paciencon ĉar jam mi timas ke mi ekenuigos vin pro mia ho, jes! tro longa raporto. Ĉe la elirejo de la borso nin atendis aro da veturiloj eĉ benkveturiloj por fari viziton al la urbo.

Oni ĉirkaŭveturis la urbon tiel vidigante ĝin al la fremduloj laŭ industria vidpunkto poste oni admiris la belajn monumentojn kaj vidindaĵojn Gentajn. Vespere je la 9^a, ree en la Borso, la kongresanoj kunvenis por la internacia balo tiel senpacience atendita; ne kiel en universala kongreso oni povis admiri la naciajn kostumojn sed ĉu oni rajtas plendi pri tio, ĉe ne la tiel belaj ceremoniaj kostumoj de la esperantistinoj ĉarmis niajn okulojn kaj ĉu ili ne harmoniis kun la tiel bele ornamita salonego, kiu havis tiun tagon eksterordinaran aspekton? Sed al ĉio estas fino ankaŭ al tiu tre ĝuata tago. Disiĝis ni proponante kiel lastan kunvenejon la restaŭracion "Royal Casino,, en la ekspozicio por la estonta vespero je la 9^a. Plej intima ĝi es:is, dancis, dancadis ni ĝis fine alvenis la horo por disiĝi. Kore ni premis la manojn kaj esprimis la deziron al baldaŭa reenkontiĝo. Nun ĉio forpasis, nur restas la agrabla memoro.

Pasintaj belaj tagoj de vera kunfratec'


Pasinta la tempo de plej pura amikec'

Ĉu baldaŭ ili revenos?

Sed ni ne plu longdaŭre eniĝu en revajnsferojn! Al larealeco, al la laboro por daŭrigi tion multaj antaŭ ni kuraĝe entreprenis, ĉar kio ne povas esti forgesata estas la multnombraj konsiloj elmontritaj dum la du laboraj kunsidoj.

Mi dezirus ke ĉiuj ilin havu antaŭ la okuloj, ke ĉiuj ilin konu perkere kaj ke je ĉiu okazo oni praktiku ilin laŭ sia povo por ke iam ni atingu nian noblan celon :

“ Esperanto konsiderata de ĉiuj kiel ununura hejplingvo? „



GENTO.

Aro da anoj de la Genta Esperanto Grupo faris, la 29^{an} de Junio, tre agrablan vojaĝon al Brugo kaj Heyst.

Alvenante en la « morta urbo » ni havis la grandan plezuron trovi ĉe la stacidomo gesamideanojn el tiu urbo, inter kiuj Fraŭlinoj Ledène, Priem kaj Huismans, kaj Sinjoroj Witteryck kaj De Muynck, kiuj tre afable metis sin je la dispono de la ekskursantoj por gvidi ilin tra la urbo. Post mallonga halto en la « Metropole » hotelo de la samideano S.^o Berger, kie S.^o Witteryck deziresprimis la bonvenon kaj ĝentile disdonis esperantajn gvidlibron kaj diversajn reklamilojn, oni kune faris agrablan kaj interesplenan veturadon sur la famaj brugaj kanaloj per motorŝipeto. Kvankam kelkaj inter ni tute ne estis trankvilaj kaj elsipiĝis post nelonge, la promenado bone finiĝis, kaj ĉiuj estis tre kontentaj farinte ĝin. Oni trinkis aperitivon en la vidinda « Zwarte Huis » kaj bone tagmezmanĝis en la bonkonata « Hôtel du Cornet d'Or » sidejo de la bruga grupo. La manĝado estis gajigata per la spritaj rimarkoj de la ĉarmplena filineto de nia prezidanto kaj ankaŭ de la mirinda englutega kapableco de nia sekretario.

Poste, ĉiam gvidataj de la afablaj bruganoj, oni kune veturis per la vaporŝipo « Albert I » ĝis Zeebrugge, kaj de tie oni atingis piede la banurbon Heyst, post amuziga sed iom tro malvermeta vojaĝo. En la hotelo de la samideano Emilio oni manĝetis kaj sin ripozis iomete ; tie ni faris la agrablan renkonton de S.^o Bommel, la prezidanto de la grupo el Verviers. Oni ankoraŭ promenadis laŭlonge la marbordo kaj oni sidigis kviete meze de la sablaj montetoj por admiri la ma.on. Ĝi estis vere belega kaj pentrinda, kun siaj blankaj ŝaumantaj ondetoj, siaj malproksimaj ŝipoj kaj sia mistera horizonto, kie oni dekstre ekvidas la limojn de Zelando. Ĝi estis tiel alloga ke nia prezidanto tuj cedis al la deziro lavi siajn piedojn en la puraj ondoj !!

Reveninte al Brugo, niaj tiom afablaj gegvidintoj gustumigis al ni la bonkonatan kaj bongustan urban bieron en la kelo de Sankta Antonio, kies mastrino estas ankaŭ samideanino. Fine ili bonvolis akompani nin ĝis la stacidomo kie oni disigis, promesante baldaŭan revidon dum Aŭgusto, okaze de la Internacia Esperantista Semajno-Kongreso de Gento.

Tiu ekskurso estis instruoplena por niaj novaj geanoj. Dank' al la afableco de la brugaj gesamideanoj kiuj akompanis nin la tutan tagon, ĝi pruvis unu fojon pli ke Esperantismo ne estas vana vorto kaj ke ĉiuj geesperantistoj estas vere anoj de la sama granda ronda familio.

Avizo !

Pro manko da spaco, ni devas prokrasti ĝis la Oktobra numero diversajn artikolojn, kiel : Letero de “Elefanto”, “Priskribo pri Gento”, k. t. p.

LA REDAKCIO.

Bibliografio.

Historio kaj teorio de Idó, kun antaŭparolo de R. Brandt, profesoro-lingvisto de Moskva Universitato. Librejo « Esperanto » Moskvo, Lubjanskij projezd, 3, Ruslando. Prezo : 50 kop. (Sm. 0.53)

Verkita de B. Kotzin, ĉefredaktoro de “La Ondo de Esperanto” ..

RIMARKO : Ni pli detale raportos pri tiu interesa libro post plena tralegado kaj studado.

El Parnaso de Popoloj poemaro de ANTONI GRABOWSKI ; presejo de L. Boguslawski, Varsovio, Sw. Krzyska 11. Prezo : 1.00 Sm. ; kun trasendo : 1.15 Sm.

240 paĝa, belega volumo, enhavanta plenan kolekton da poemoj, ĉu originalaj ĉu tradukitaj el 30 lingvoj : angla, bohema, bulgara, dana-norvega, finna, flandra-holanda, franca, germana, greka antikva, greka nova, hispana, hungara, itala, japana, kartvela, kataluna, latioa, litova, luzica, pola, polak-ŝuba, portugala, provenca, rumana, rusa, serba-kroata, slovak, slovena, sveda, ukrania.

Tiun trezoron el la tutmonda literaturo devas posedi ĉiu esperantisto ; ĝi estas ja necesega al ĉiu poeziamanto, kantisto, deklamanto, monologisto ĉe esperantaj festoj, koncertoj, kongresoj, k. t. p.

Ni altiras la atenton de niaj gelegantoj sur tiun-ĉi punkton :

La libro estas **senpage** aldonata al ĉiu abono de « Pola Esperantisto », kies jarabono kostas 2.65 Sm.

Ekzistas de « El Parnaso de Popoloj » luksa eldono sur plej bela papero, kun la portreto de l'aŭtoro ; prezo : 2.09 Sm. ; kun trasendo 2.25 Sm. ;

M. S.

Kolektado :

S^o G. Vermandere, rue de la Bienfaisance 85. Gento, kolektas fotografajojn de geesperantistoj; li ankaŭ kolektas ĉiuspecajn reklamilojn, (glumarkoj, k. t. p.) por Esperanto.

S^o M. Sebruyns, Gentstraat, 34, St-Amansberg (Gento-Belglando) serĉas en ĉiu lando korespondanton, kiu konsentus sendi al li NE-ilustritajn poŝtkartojn, kartleterojn, banderolojn de ĵurnaloj kun surprisitaj poŝtmarkojn, unuvorte ĉion, kion oni nomas « tutajoj ». Interŝanĝe li sendos ĉion, pri kio la korespondantoj petos. Respondos ĉiam kaj tuj.



INTERŜANĜADO.

(Sub tiu-ĉi rubriko, ĉiu membro povas fari proponon pri interŝanĝado de Poŝtkartoj ilustritaj, Poŝtmarkoj, Leteroj, Ĵurnaloj, k. t. p.)

Deziras korespondadi kaj interŝanĝi ilust. p. k. aŭ p. m, nur kun fremduloj :

- | | | |
|---|---|----------------------------------|
| S ^o <i>Georges Defawe</i> | 42, Rue Quinaux, | Bruxelles. |
| Fino <i>Irma De Vlieger,</i> | 15, Place de l'Ecluse, | Gand. |
| » <i>Fouquet,</i> | 28, Rue du Mouton, | id. |
| » <i>Schepens,</i> | 14, Rue Ch-Louis Dierickx | id. |
| » <i>O. Standaert</i> | 66, Rue Savaen | id. |
| » <i>Suz. Van Hyfte,</i> | 228, Rempart de la Biloque, | id. |
| » <i>Claire Verschueren</i> | 91, Rue Joseph Plateau, | id. |
| » <i>Valerie Sallmann</i> | Schönbüchlerstrasse, 16 | Schonlinde (Austrio) |
| S ^o <i>Georges Dezutter,</i> | 76, Pêcherie, | Gand. |
| » <i>Ernest Simonis,</i> | 55, Rue des Entrepreneurs | Mt-St-Amant. (Gand) |
| » <i>Flor. Van Cleemput,</i> | 137, B ^d . de la Citadelle, | Gand. |
| » <i>Vermandere,</i> | 85, Rue de la Bienfaisance, | id. nur I. P. |
| » <i>Jozef Henke,</i> | Zittauerstrato (Saksujo) | Neugersdorf P. I. respondas tuj. |
| » <i>Otto Geier,</i> | E. G. Hoffmannstrato 243, | » » » » |
| » <i>R. Wohlstadt,</i> | Feldstrasse 17 ^{II} , Kiel [Germanujo] | |

ĈE LA REDAKTEJO : oni akceptas tre dankeme poŝtmarkojn, ne nur maloftajn por kolektajo, sed ankaŭ ĉiuspecajn; ankaŭ ne-ilustritajn poŝtkartojn, banderolojn por Ĵurnaloj kaj kartleterojn. Oni sendos interŝanĝe ĉion pri kio oni petos (ilustritajn poŝtkartojn, ĵurnalojn, librojn, k. t. p.)

Timbres-poste de tous pays à prix réduits.

J'envoie gratis et franco mes prix-courants. Contre envoi de 500-1000 timbres assortis, j'envoie la même quantité en timbres d'Espagne.

R. ALVAREZ MORALES

Strachan 24.

MALAGA (Espagne.)